nia voĉo

madrida esperanto-liceo septembro 2025

## BALDAŬ MALFERMIĜOS LA KURSOJ EN UNED, KUN GRAVA AMPLEKSIGO

Denove ĉijare estos instruata kurso de Esperanto en la Nacia Universitato por Neĉeesta Edukado (Universidad Nacional de Educación a Distancia, UNED), ne nur en la du kutimaj niveloj A2 kaj B1, sed, kiel grava novaĵo, ankaŭ en **nivelo B2**.

Ni jam povas antaŭanonci la baldaŭan malfermon de la enskribiĝo por la venonta akademia jaro, ekde la 8a de septembro, ĝis la 22a de oktobro. La kurso mem komenciĝos en novembro.

La kursoj B1 kaj B2 estas instruataj en Esperanto mem, do ni rekomendas ke vi sciigu pri ĝi al viaj amikoj ekster Hispanio, ĉar ankaŭ ili povas enskribiĝi, kaj tiu estas unu el la tre maloftaj kazoj en kiuj oni ricevas universitatan diplomon pro la studado de Esperanto.

Vidu ĉiujn informojn ĉe: https://www.uned.es/universidad/inicio/estudios/idiomas.html.

## SEPTEMBRAJ RENKONTIĜOJ

Ekde la 1-a de septembro ni rekomencas la renkontiĝojn en la sidejo, ĉiujn lundojn ekde la 18,30 horo. Ni organizas babiladojn, kaj foje teatrajn prezentaĵojn kaj aliajn aktivadojn. Konkrete, la 1-an de septembro vizitos nin Viviana, el Italio, kiu parolos al ni pri ricevita kurso pri la esperanta literaturo.

La unuasabata renkontiĝo okazos la 6-an de septembro, je la 18,30 horo, en la lastatempe kutima loko, la polpejo Pulpería O Miño, strato Idioma Esperanto, num. 2, de Madrido (metrohaltejo Alsacia, lineo 2). Memoru ke ĝi estas malferma al iu ajn, sendepende de la lingva nivelo kaj ke la babilado estas libera, sen programo.




Ni nun komencos plani aliajn aktivadojn. Tiurilate, ni memorigas ke fine de septembro alproksimiĝas du datoj tre gravaj por nia Movado kaj nia kontinento: la Internacia Tago de Paco (la 21-an) kaj la Eŭropa Tago de Lingvoj (la 26-an). Kiel pasintjare, Eŭropa Esperanto-Unuiĝo proponas kunligi tiujn du datojn en la "Semajno de Lingvoj kaj Paco". Ni citas el ilia mesaĝo: «La temo elektita ĉi-jare de Konsilio de Eŭropo kaj Eŭropa Komisiono por la Tago de Lingvoj estas aparte alloga, ĉar vere kongrua kun niaj celoj, nia vivmaniero, nia aliro al la monda interkompreniĝo: "Lingvoj malfermas korojn kaj mensojn!" (vidu ĉe la retejo https://edl.ecml.at/ por la mesaĝo en via(j) nacia(j) lingvo(j)). Ĝi tute taŭgas do ankaŭ por la Tago de Paco, ĉar –kvankam supraĵe iom naiva– ĝi donas la veran esencon de nia ekzisto, tia, kian imagis, bildis kaj puŝis Zamenhof mem. Krom tio: la instanco, kiu ĉiujare aranĝas la Eŭropan Tagon de Lingvoj, havas sian sidejon en la urbo gastigonta la 111-an UK, nome Graz (Aŭstrio)!» Bv. do esti atenta al la novaĵoj pri pretigotaj eventoj.



## EN LA LONDONA KLUBO

La prezidanto de Madrida Esperanto-Liceo, Félix Jiménez Lobo, vizitis la Londonan Esperanto-Klubon (LEK) dum ili kunvenis fizike la 8an de aŭgusto. Li prezentis sin kiel prezidanton de MEL, kaj salutis nome de la asocio al LEK.

En la foto videblas famuloj kiel Anna Löwenstein kaj Stano Marček.

## PARTOPRENO EN INTERNACIAJ KONGRESOJ

Kiel anoncite en pasintaj bultenoj, dum la somero okazis pluraj internaciaj kongresoj, kun partopreno de madridanoj.

Sube vidu du fotojn de madridanoj partoprenintaj la Universalan Kongreson de Esperanto, kiu ĉijare okazis en la ĉeĥa urbo Brno (Burno) inter la 26-a de julio kaj la 2-a de aŭgusto. Maldekstre vi povas vidi Elsa-n deĵorantan en la tablo de Hispana Esperanto-Federacio dum la Movada Foiro de la Kongeso, kaj dekstre postkongresan renkontiĝon familian kun Doktoro Zamenhof en Vieno.







Du kongresoj havos konsekvencojn por la estonta agado proksime de ni. Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) decidis ke ĝia venontjara kongreso okazos en Hispanio, konkrete en la urbo Leono, tuj post la hispana kongreso planita por meze de julio en la biskaja urbo Portugalete. Siavice, Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) decidis ke la 82-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazos de la 9-a ĝis la 16-a aŭgusto 2026 en Tiana (proksime al Barcelono). Kompreneble, ni havos ŝancojn informi plu pri la planoj por ambaŭ eventoj.

## PLIAJ LOKOJ POR INFORMIĜI

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero vi povas trovi nin ĉe: https://x.com/LiceoMadrida. Kaj memoru ke MEL malfermis profilon ankaŭ en la socia reto *Bluesky*, en la adreso: https://madridaliceo.bsky.social.

Ankaŭ eblas aliĝi al la ŭacapa grupo, por la madridaj esperantistoj, per la ligilo https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.